


ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2002/2

aŭtuno / vintro 2002

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*



LUMO

Lumon eldonas dufoje jare KEA, P.O. Box 2159, Sidney, BC, Kanado V8L 3S6

www.esperanto.ca/kea/

Lumo ('light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association

Lumo ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

Enhavo de la numero

Novajoj de KEA	3
Sukcesa 9-a Internacia Semajnfino (Okemo)	3
Nekrologo (J. Jarmasz)	3
22a NOREK	4
Nova Retejo de la libro-vendejo de ESK	5
Alvoko al Ontarianoj kaj Kebekianoj	6
Somfersto 2002 en Toronto	7
Artikoloj	8
Kooperismo (B. Arthur)	8
La lingvaj politikoj de kanadaj partioj (B. Arthur)	9
Recenzo de la <i>Nova PIV</i> (S. Davies)	12
Al lingva demokratio (R. Corsetti kaj aliaj)	14
Mesaĝo de la prezidanto de UEA (R. Corsetti)	15
Internaciaj novaĵoj	16
Ora jubilea kongreso de ELNA	16
John Buchanan Prize	18
Solvo de la lasta krucvortenigmo (D. Reble)	19
Krucvortenigmo (D. Reble)	20

Kolumno de la redaktoro

Unue, necesas gratuli Ken Price (el Toronto), oftan kontribuanton al nia revuo, kiu unue solvis la krucvortenigmon en la lasta numero. Konsolan premion (\$10) ni sendos al Justin Dessureault (el Boisbriand), kiu ensendis la duan korektan solvon. Ankaŭ korekte solvis la enigmon Bob Williamson (Halifakso) kaj Bruce Arthur (Grenfell, SK). Mi gratulu ilin ĉiujn kaj kaptu la okazon noti ke ni nun ricevas pli kaj pli da respondoj al la krucvortenigmoj, kio estas ĝojiga afero. Kompreneble, ne eblas okazigi tian konkurson sen la kontribuo de enigmo – pro kio mi danku denove al Don Reble.

Kiel la pli atentaj el vi rimarkos, mi transloĝiĝis: mi nun loĝas proks. 150 metroj for de mia antaŭa adreso, sed en iom pli granda kaj bela apartamento. Pli grave, ĉar mia edzino kaj mi nun troviĝas je la plej supra etaĝo, ni ne plu suferas pro superaj najbaroj, kiuj ekzercas sin dum la tuta nokto (bruaĉe). Bv. do certigi ke vi uzos la novan adreson (troveblan sube). Ĉi-numere, estas iom malpli da internaciaj novaĵoj: ŝajne mi nun ricevas malmultajn gazetarajn komunikaĵojn de UEA, same pri ret-info; mi esperas ke la situacio pliboniĝos antaŭ la venonta numero. Finfine, mi (kiel kutime!) ŝuldas grandan dankon al Steĉjo Norvell pro lia kompostado ktp.

Geoffrey Greatrex
1205-261 Cooper street
Ottawa, Ontario, KANADO K2P 0G3
<greatrex@uottawa.ca>

Novajoj de KEA

SUKCESA 9-A INTERNACIA SEMAJNFINO

La 9-a ISE en Okemo, Vermonto estas parto de pasinteco de nia movada pasinteco. Mi revenis feliĉa de ĝi ĉar kun la tempo oni sentas ke tiu semajnfino estas nun parto de Esperantio. Dum la 3 tagoj eblis sperti amikecon pere de Esperanto, kaj tio estis mia celo dekomence. Krei la eblecon vere vivi esperante de mateno ĝis noktomezo.

Nu, mi rakontu pri la programo. La temo estis 'Instrui pri nova mondo', kaj ni invitis Arnoldon Victor instrui la bazan kurson per la Ĉe-metodo kaj Boris Kolker la mezan kurson per sia instrulibro *Vojaĝo al Esperanto-lando*. Ambaŭ kursoj estis tre sukcesaj. Por la 'lertuloj' okazis plej diversaj prelegoj kiel, ekzemple, 'Mia afrika vojaĝo', 'Kio estas Pasporta Servo', 'Revuoj en Esperanto', 'Historio de la E-movado en Rusio', 'Indiĝenaj kulturoj kaj lingvoj de Nordokcidenta NordAmeriko' ktp.

La amika vespero plensukcese okazis kun vigla partopreno kaj la komuna bufeda festa vespermanĝo estis bunta kiel kutime. La kultura vespero iel rapide finiĝis je la 21-a horo ĉar la propono prezenti vidbendojn pri la IJK en Brazilo allogis malmultajn homojn. Tamen la gejunuloj kuniĝis ĉe nia loĝejo kaj ĝis la 2-a matene bone amuziĝis.

En la 9-a ISE partoprenis 35 Usonanoj, 17 Kanadanoj kaj 3 eksterlandanoj, do sume 55 personoj. En 2003, ni celu esti almenaŭ 75 homoj por kunfesti la dekjariĝon.

Normando Fleury

NEKROLOGO

D-ro Jerzy Jarmasz el Otavo mortis pro kancero la 26an de aŭgusto 2002. Li estis eks-delegito de UEA por Otavo; li ankaŭ estis dumviva ano de UEA. Jerzy naskiĝis en 1939 en Smyga, Pollando. Post la teruraj mizeroj de la milito, li translokiĝis al Francio, kaj poste al Kanado.

Jerzy estis psikologo. Li dankis al Esperanto pro tio ke li fine povis reviziti sian hejm-landon en 1987, kiam la Universala Kongreso de Esperanto okazis en Varsovio, Pollando, okaze de la cent-jara jubileo de Esperanto. Jerzy estis fervora Katoliko kaj multe kunlaboris kun sia pregejo kaj kun la katolika organizo "Développement et paix", kiu helpas al evoluado de malriĉaj landoj. Al li ankaŭ gravis ke Poloj en Kanado memoru sian kulturon kaj lingvon.

Li postlasas sian vidvidon, Mercedes, kaj tri infanojn.

Yves Bellefeuille

22-A NORDOKCIDENTA REGIONA ESPERANTO-KONFERENCO [NOREK], 27-29 septembro 2002

Ĝus finiĝis en kanada urbeto Sidney/Brita Kolumbio, sur la Vankuvera Insulo kaj meze inter Viktorio kaj Vankuvero, nia 22-a NOREK (laŭ aserto de kelkaj jam la 23-a tia kunveno!). Anoncis sin 31 partoprenantoj ne nur el la tuj apuda regiono kaj el kanadaj provincoj Alberto kaj Ontario, sed ankaŭ el usonaj ŝtatoj Vaŝingtonio, Kalifornio kaj Idaho. (Unu ĝisostulo el Toronto bezonis preskaŭ 5 flughorojn por atingi la konferencejon, kaj tio jam por la kvara sinsekva jaro!) Partoprenis ankaŭ deksep pluŝaj ursoj! Ili estis honoraj gastoj, ĉar la vespero estis dediĉita al la 'Centjara Datreveno' de tiu ĉi ludilo, kiu profunde ŝanĝis preskaŭ ĉies infanaĝon (ne nur!).

Tre kapable organizis la semajnfino Wally kaj Olga Du Temple, kun la helpo de pluraj lokaj samideanoj. La programo okazis en bela nova komunuma centro, kaj la plimulto de la eksterurbaj partoprenantoj loĝis en tre oportune lokita motelo trans la strato. Registrado okazis en la motela akceptejo mem, kaj la vendreda interkonatiĝa vespero en unu el la pli grandaj dormoĉambroj. La programon tre kapable kunordigis Wally kaj Olga, kaj inkludis komunan kantadon kun lerta gitara akompanado de Ralph Gonyea, kaj delikatajn fromaĝajn kaj fruktajn frandaĵojn kun (kompreneble!) honorvino.

Prezidanto de la viktoria grupo Ralph Gonyea kaj prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio Brian Kaneen oficiale malfermis la sabatan sesion per kelkaj salutvortoj, kaj klarigoj pri programeroj, aranĝoj ktp. Trifoje kaj trinivele dum la konferenco Brian Kaneen prezentis ekspreskurson pri Esperanto surbaze de la MAZI-vidbendo. Samtempe en alia ĉambro oni prezentis por pli fluaj parolantoj tri programerojn:

- Enkonduko de la kongresa temo: Jaro de la monto. Jam estas tradicio de NOREKaj sekvi la UNESKO-elekton de oficiala jara temo. Por emfazi efemeron de homa vivo kaj eternecon de montoj Olga du Temple tradukis kaj prezentis ĉapitron el la libro "Pensu kiel monto" verkita de fama pentristo, Roberto Bateman, kiu vivas sur apuda insulo Saltspring. Sekvis interesa diskuto pri la frazo, "Pensu kiel monto."

- Monsistemo de Saltspring Island: Insulo Saltspring estas kvazaŭ miniatura ŝtato. Ĝi estas modelo de bone funkcia (laŭ ekonomiaj kaj ekologiaj kriterioj) komunumo. Por vivi pli-malpli memstare kun nur minimumaj importaĵoj kaj eksportaĵoj, la komunuma banko eldonis 'insulan monbiletaron', samvaloran al la kanada. En la eksterinsula mondo tiu ĉi monbiletaro estas interesa kolektaĵo por numismatoj. Krome kaj dank' al speciala presmaniero ĝi ne estas falsebla.

Post mezmatena kafaŭzo, Lusi Harmon prezentis la lastan parton de la nova videobenda kurso 'Pasporto al la Tuta Mondo'. Brian Kaneen prezentis prelegon pri 'Homaj Lingvaj Rajtoj' (kaj inkludis parton de prelego, kiun prezentis Humphrey Tonkin ĉe la aŭgusta EEU-kongreso). Profesia eksvendisto David Yaki el Kalgario prezentis programeron 'Kiel vendi Esperanton!' Por tagmanĝi oni povis libere elekti inter granda nombro da lokaj manĝejoj laŭlonge de la ĉefstrato.

Posttagmeze sekvis raportoj de ĉeestintoj ĉe la brazila UK-o, kaj skriba raporta sendita de nia kanada komisiito en la Amerika Komisiono, Dick Piper. OT prelegis mallonge, sed interese, pri la "Kuracaj ecoj de rubuso." Post plia kafaŭzo kaj frandaĵoj sekvis dua lingvolecino kaj samtempe pliaj programeroj:

- Misteroj de Harris Burdick: Olga du Temple priparolis kaj prezentis aron de 15 ilustraĵoj de malaperinta artisto, Harris Burdick. La ilustraĵoj estis iam destinitaj por rakontoj, kiuj bedaŭrinde malaperis samtempe kun la artisto. Dum la lastaj kelkaj jardekoj la ilustraĵoj inspiras al verkado de novaj rakontoj, sed ĝis nun nur en anglalingva medio. Esperantistoj en diversaj landoj povus interese pliriĉigi la rakonton.

- Konservado de la tero: Dua programero rilatanta al la ĉeftemo estis aro da diapozitivoj, kiujn liveris provinca organizaĵo celanta protekti regionojn gravaj por pluvivado de plantaj kaj bestaj specioj. Wally du Temple klarigis kialojn por unuopaj decidoj.

Oni vespermanĝis piknikstile en la konferencejo mem, post kio je la 20-a horo oni translokiĝis al teatra salono, kie kantistino Joëlle Rabu kaj liaj muzikistoj bele koncertis dum du horoj por ni kaj la loka publiko. (Joëlle jam prezentis programojn ĉe UK-oj en Varsovio kaj Pekino). Ŝi kantis en tri lingvoj: angle, france kaj esperante, kaj finis per kanto dediĉita al la centjara jubileo de Esperanto. Kvankam nur 10-15% de la aŭskultantaro estis esperantistoj, Joëlle estis longe ovaciata.

Sabatmatene sekvis dua parto de prelego de David Yaki, librovendado, komuna fotado, kaj tria paroliga leciono de Brian Kaneen. La programo finiĝis akurate je tagmezo, post kio oni devis rapide disiĝi por ne maltrafi pramon, aŭtobuson, aviadilon ktp. Resume: plia tre agrabla semajnfino en Esperantujo!

Brian Kaneen, Wally du Temple

NOVA RETEJO DE LA LIBRO-VENDEJO DE ESK




Bonvolu atenti ke la katalogo de la libro-servo nun troviĝas je:

<http://www.geocities.com/eskkatalogo/katalogo.htm>

Nia retejo ĉe SYMPATICO plenas kaj ni devis apartigi la katalogon.

— Normand Fleury



ALVOKO AL ONTARIANOJ KAJ KEBEKIANOJ

Iom pli da Esperantio mi petas!

Farbante matene ĉe mi, mi umis pri la Esperanto-movado. Nun mi aktivas de 20 jaroj ene de la Kebekia E-movado kaj mi povas diri ke ni multon faris por disvastigi la movadon dum tiu duobla jardeko. Rezulte, ĉu vere la movado kreskis? Mi ne povus kontente jesi al la demando. Sed mi tamen ne bedaŭras ĉar kiam ni alvenis (mia edzino Zdravka kaj mi) al Montrealo en 1982, la E-movado estis sufiĉe aĝa. Nun fine, mi vidas ke ĝi junas, mezjunas kaj pliaĝas. Do ni atingis ekvilibron, kvankam ni diru ke daŭre estas multe pli vira movado ol virina.

Nu, umante mi demandis al mi kial la Montreala Klubo malviglas kvamkam sufiĉe da homoj membras? Mi komprenas ke klubaj kunsidoj ne povas alogi ĉiujn; junuloj havas multajn studojn, mezaĝuloj familion kaj pliaĝuloj fojfoje venas. Sed mi pensas ke preter ĉio tio, la reto (kaj moderna vivo) iel malhelpas ĉar eblas facile esperantumi sen eliri sian domon. Jes, ĉe la reto estas tiom da legaĵoj, radio-elsendoj kaj eĉ la ebleco babili aŭ korespondi tutmonde. Nu, ĉu mi simple bedaŭru kaj ankaŭ same faru?

Mi tamen pensas ke Esperantio estas io pli agrabla ol nur sidi antaŭ komputilo! Pruvo estas ke la 9-a Internacia Semajnfino Esperantista en Okemo, Vermonto altiras 60 esperantistojn ĉiujare. Mi estas la ĉefa organizanto kaj ricevas plurajn belajn dankmesaĝojn post ĝi. De komencanto kiu unua foje spertis 'vivantano' Esperanton ĝis pli sperta samideano kiu ĝuis la etoson kaj la programon.

Certe, iri al Esperantio estas bela sperto, sed multe kostas iri al la UK aŭ al Europo por esperantumi. Tiam, ni kreu pli da Esperantio en Ameriko. Mi proponas ke ekde 2003 ni ĝemeligu la klubojn en Toronto, Otavo, Montrealo kaj Kebeko. Vi eble diros tre bone sed kio poste? Daŭre restos la grandaj distancoj inter tiuj urboj!!!

Fine de mia umado mi pensis pri nova renkontiĝo printempa. En Kanado, ni havas ferian tagon la trian lundon en majo. Tiam ne plu estas neĝaj ŝtormoj, ne estas familia aŭ religia festo (kiel Pasko kaj Kristnasko) ni do povus renkontiĝi kvarurbe. Se ni alternative organizas ĝin ekzemple en 2003 en Otavo, en 2004 en Kebeko, en 2005 en Toronto en 2006 en Montrealo kaj reen al Otavo en 2007, neniu multe laborus. Mi lanĉas la ideon, pripensu, umu kaj poste reagu al mi. Mi pensas pri turisma semajnfino kun vizito al muzeoj, urba gvidado en Esperanto, restoraciaj manĝoj kaj tranoktado ĉe esperantistoj kaj en hoteloj laŭvole. Ne necesus lui kunvenejon, pretigi kursojn kaj prelegojn. Temus pri semajnfino da simpla esperantumado en amika etoso. Tio ja laŭ mi mankas en Ameriko kaj nepre komencantoj kaj novuloj devas sperti tion. Sperti Esperantion.

Mi atendas viajn reagojn. Movademe, Normando Fleury, Montrealo:
(esperanto@sympatico.ca) respondilo/faksilo: 514 272-0151

SOMERFESTO-2002 EN TORONTO


Sabaton la 6an de julio, torontaj esperantistoj kunvenis en la festoĉambro de 77 Carlton Strato ekde 2ptm por nia tria somerfestoj. La unuaj du okazis en Waterloo kaj Londono, Ontario.

Ni ĝojas ke kelkaj aliurbanoj venis kaj partoprenis. El Otavo venis Charlene kaj Arono Chapman, kaj Clayton Smith (Argilo). Karlina kaj Arono estas relative novaj geedzoj. Argilo loĝos en Otavo ĝis la somerfino. Christian Richard (Kriĉjo) kiu baldaŭ denove estos Torontano, post kelkmonata laborado en St. Catherines, aperis inter ni denove. Chuck Smith venis el Harrisburg (Pensilvanio) kaj Kejlina el Port Hope Ontario. Du Stefanoj venis, Stefano Crowe el Londono (Ont.) kaj Stefano Farrington el Roĉestro, Novjorkio.

La vetero estis bona, kaj ni ankaŭ uzis la korton ekster la granda festoĉambro. Malvarmaj trinkaĵoj kaj kafo kaj teo estis ĉiam haveblaj. Diversaj salatoj, fruktoj, biskvitoj, kaj kukoj ankaŭ estis daŭre preneblaj de la servotablo, dum la posttagmezo kaj vespero. La klubo mendis kelkajn diversajn picojn, kiuj estis liveritaj iom post la kvina. Ne mankis manĝaĵoj, kaj ne mankis interesaj konversacioj. Foje Jeremy Bass, aŭ Jean Guy Richard, ludis la pianon, kaj kantemuloj kantis Esperantajn kantojn. Arono montris perkomputile filmon kiun li faris pri "Kanada Tago en Otavo" je la unua de julio ĉijare. Ni ne povas dubi ke la festo estis ĝuita sukceso ĉar la lastaj personoj ne foriris ĝis proksimume noktomezo.

Lunjo proponis, ke en 2003 ni havu somerfeston en Otavo. Ni esperas ke la Otavanoj konsentos helpi - ilia loka scio estas nepre havenda. Tiam, se informoj pri la dato kaj loko estos diskonigitaj sufiĉe frue, ni espereble allogos pli grandan nombron da vizitantoj.

Ken Price



Artikoloj

KOOOPERISMO

Kooperaj kompanioj estas grava parto de la kanada ekonomio. Sed kio estas koopera kompanio? La amas-komunikiloj malofte donas informojn pri ili, kvankam ili estas tre interesa speco de kompanio.

Koopera kompanio estas kompanio, kiu estas posedata kaj regata de siaj uzantoj. Ekzemple, koopera butikoj estas posedata de la homoj, kiuj aĉetas en ĝi. Koopera banko estas posedata de la homoj, kiuj havas monon en ĝi, aŭ kiuj pruntoprenas monon de ĝi. Estas aliaj kooperaj kompanioj de terkultivistoj - ĉi tiuj kompanioj prilaboras aŭ merkatadas la produktojn de la terkultivistoj. Koopera apartamentaro estas posedata de siaj loĝantoj.

Oni povus diri, ke estas du specoj de kooperaj kompanioj. La unua speco estas kompanio, kiu estas posedata de la homoj, kiuj uzas ĝin. La dua speco estas granda koopera kompanio kiu estas posedata de aliaj kooperaj kompanioj. Ĉiuj veraj kooperaj kompanioj estas demokratiaj. En la unua speco de koopera kompanio, tio estas, en rekte posedata kompanio, ĉiuj uzantoj/posedantoj estas egalrajtaj. Tio estas, kiam ĉi tiuj membroj kunsidas, ĉiu havas unu voĉdonon. Ili elektas inter si estraron, kaj voĉdonas pri aliaj aferoj same kiel en ia ajn demokratia organizo. En la dua speco de koopera kompanio, la malgrandaj kooperaj kompanioj kiuj posedas ĝin elektas delegitojn, kaj ĉi tiuj delegitoj kunsidas kaj elektas la estraron por la granda kompanio. La malgrandaj kooperaj kompanioj uzas servojn aŭ aĉetas varojn de la granda kompanio, kiun ili posedas - ofte kooperaj kompanioj kiuj uzas plimulte de la granda kompanio rajtas sendi pli da delegitoj.

Kooperaj kompanioj, teorie, povus funkcii senprofite. Tial ili povus doni al siaj membroj la kiel eble plej bonan prezon. Tamen kutime kooperaj kompanioj celas gajni profiton. Sed tio ne estas malbona al la membroj, ĉar la membroj ja posedas la kompanion kaj ĝian profiton, kaj la kompanion povas repagi la profiton al la membroj jarfine. Kelkfoje kooperaj kompanioj donas monon al la membroj, sed ofte la estraro decidas, ke estus pli bone investi la monon por plibonigi la kompanion, por ke ĝi povu pli bone servi la membrojn. Multaj kooperaj kompanioj donas akciojn al membroj anstataŭ mono - en pli posta jaro, la koopera kompanio reaĉetas la akciojn, kaj tiel la membroj rericivas sian monon.

Iuj membroj de koopera kompanio uzas ĝin pli ol aliaj membroj. Se la kompanio gajnas profiton, ĝi supozeble gajnis pli de la membroj, kiuj pli multe uzis ĝin. Do kiam koopera kompanio elpagas sian profiton, ĝi pagas ĝin al la membroj proporcie al kiom ili uzis la kompanion.

Klaras ke estas avantaĝoj aliĝi kaj uzi kooperan kompanion, aŭ eĉ starigi novan. Oni rajtas voĉdoni kaj ankaŭ ricevi parton de la profito. Sed se oni estas membro de koopera kompanio, oni atentu pri la kompanio, ĉeestu kunsidojn, legu la jarraporton, kaj voĉdonu. Laŭ mia sperto, nur malgranda ono da membroj ĉeestas la jarkunsidon, kaj la estraro plej ofte elektigas senkonteste pro manko de kandidatoj. Se membroj ne atentis, estas danĝero ke la estraro pleniĝos je malsaĝuloj. Iuj kooperaj kompanioj fartas malbone, sed aliaj bone, kaj ili restas grava parto de la ekonomio.

Bruce Arthur

LA LINGVAJ POLITIKOJ DE KANADAJ PARTIOJ

La federala registaro de Kanado uzas du lingvojn kiel oficialajn lingvojn, t.e. la angla kaj la franca. Ĉiu partio en la parlamento apogas ĉi tiun politikon. Sed pri detaloj ili havas malsamajn opiniojn.

Liberala partio

Kiel ni scias, la Liberala partio regas Kanadon; tial la lingvaj politiko de ĉi tiu partio estas la politiko de la federala registaro. Ambaŭ oficialaj lingvoj estas uzataj en la parlamento, kun samtempa interpretado. Ĉiuj federalaj leĝoj presiĝas en ambaŭ lingvoj. La fundamento de lingvaj politikoj estas la Leĝo pri Oficialaj Lingvoj de 1969. Ĉi tiu leĝo celas doni al ambaŭ lingvoj egalajn rajtojn en ĉiuj federalaj institucioj. Temas ne nur pri servado al la popolo, sed ankaŭ pri komunikado en la registaro mem.

Servoj de la federala registaro al la popolo estas disponigitaj en ambaŭ lingvoj tiel ke servataj homoj povas elekti kiun lingvon uzi. Por ebligi tion, la registaro bezonas multajn dungitojn kiuj parolas ambaŭ lingvojn. Tamen, la registaro disponigas iujn servojn en unu sola lingvo se la dua lingvo malofte bezoniĝas, kiel en multaj malgrandaj poŝtejoj. Eldonaĵoj por la popolo estas presitaj en ambaŭ oficialaj lingvoj. Pro tio, la registaro devas dungadi multajn tradukistojn. Sed multaj dokumentoj, kiujn pretigas la registaro por sia propra uzo, estas en nur unu lingvo.

Lingvo-uzo inter registaraj dungitoj kaj iliaj superuloj ne samas en ĉiu parto de Kanado. En regionoj, kiujn la registaro nomas dulingvaj (ekzemple, Otavo), dungitoj de la federala registaro rajtas elekti kiun lingvon uzi por komuniki kun siaj estroj. Tamen, en regionoj, kiujn la registaro nomas unu-lingvaj (ekzemple, Kalgario), dungitoj uzas la lingvon de la regiono. Tiel multaj estroj en dulingvaj regionoj devas esti dulingvaj, sed ne en unulingvaj regionoj. Multaj postenoj en la federala burokratio postulas nur la anglan lingvon. Iuj (sed multe malpli) postulas nur la francan, kiuj iuj postulas nur unu lingvon, kiu rajtas esti aŭ la angla aŭ la franca. La aliaj postenoj en la registara dungitaro postulas la kapablon uzi ambaŭ lingvojn. Por pleigi tian postenon, la federala registaro povas dungi kandidaton, kiu parolas ambaŭ lingvojn, sed kiu eble aliaspekte estas malpli kapabla ol aliaj kandidatoj. Aŭ la registaro povas instrui duan lingvon al jama dungito, kio kostas milojn da dolaroj. La registaro uzas ambaŭ metodojn.

La federala registaro disponigas radiofonajn kaj televidajn servojn en ambaŭ lingvoj, sed eskter la urboj, multaj homoj ne ricevas ambaŭ lingvojn. La etiketoj sur manĝaĵoj en la butikoj devas esti en ambaŭ oficialaj lingvoj. Alia parto de la lingvaj politikoj estas apogo al la vivpleneco kaj disvolvigo de la angla-parolanta malplimulto en Kebekio kaj de la franc-parolantaj malplimulto en aliaj provincoj. Por fari tion, la federala registaro faras iom grandajn pagojn al pluraj komunumaj organizaĵoj.

En Kanado, lernejoj estas afero de la provincoj. Tamen, la federala registaro donas monon al lernejoj por malplimulto (ĉu franc-lingvaj aŭ angla-lingvaj). Mi pensas ke la federala registaro ankaŭ donas monon al lernejoj, kondiĉe ke ili instruas la alian oficialan lingvon kiel duan lingvon.

La lingvaj politikoj de la federala registaro koncernas ankaŭ aliajn lingvojn. Estas ĝia celo antaŭenigi ankaŭ iajn neoficialajn lingvojn. Iuj registaraj servoj donas monon por antaŭenigi indiĝenajn lingvojn, kaj apartaj servoj provizas organizaĵojn, kiuj instruas aliajn neoficialajn lingvojn, per kelkaj donacoj.

Kiam la registaro diras ke ĝi volas antaŭenigi neoficialajn lingvojn, ili ŝajne pensas pri naciaj lingvoj, ne pri Esperanto, kiu estas internacia lingvo. Tamen, laŭ mia sperto, la registaro estas amike tolerema rilate al Esperanto. Mi opinias, ke ili neniam proponis mondonacon al Esperanton, sed ili agnoskas Kanadan Esperanto-Asociion kiel oficiala bonfara asocio. La registaro pagas la kostojn de la Komisiito pri oficialaj lingvoj kaj ties dungitoj. Ili superrigardas la lingvajn politikojn de la federala registaro kaj donas jaran raporton pri tio al la parlamento.

Kanada Alianco

La Kanada Alianco, la opozicia partio en la parlamento, haas multajn ideojn kiuj malsamas al tiuj de la Liberala Partio, kaj la temo de lingvaj politikoj ne estas escepto. Iliaj oficialaj politikoj pri lingvoj estas mallongaj, do mi prezentas ĉi tie la tuton:

40. Ni subtenas ke plej gravaj federalaj institucioj, kiel la parlamento kaj la plej alta kortumo, devas servi kanadanojn en kaj la angla kaj la franca, tiel ke respuguliĝas la lingva realeco de la servata komunumo. Ni intencas certigi ke federalaj leĝoj agnoskas la ĉefan regrajton de la provincoj rilate al lingvo kaj kulturo kaj ankaŭ akcepti la prirespondecon de la federala registaro daŭrigi rajtojn de malplimultoj.

41. La rajtoj de malplimultoj estos daŭrigataj per disponigado de servoj an kaj la franca kaj la angla en ĉiu loĝantar-nombrada subdistrikto aŭ regioneto (kampara distrikto aŭ urba kvartalo) kie ne malpli ol dek el cent de la tiea loĝantaro uzas aŭ la anglan aŭ la francan en la ĉiutaga vivado.

42. Ni favoras la starigon de federalaj normoj pri dungado, kiu disponigos kiel eble plej multajn postenojn al unulingvaj kandadanoj (ĉu francparolantaj aŭ anglaparolantaj), kaj certigos ke neniu lingva grupo traktiĝos maljuste, prefere aŭ malegale fare de la dungadaj normoj de la federala burokratio, la armeo aŭ la federala polico.

43. Ni subtenas ĝustan raportadon de la kostoj de federala elspezado pri oficialaj lingvoj, kaj ni devigos ke sendependa reviziisto disponigu jaran raporton pri la niveloj de elspezado.

Antaŭ du aŭ tri jaroj, Jim Pankiw, parlamentano de la Kanada Alianco, proponis ŝanĝon al la Leĝo pri Oficialaj Lingvoj. (Pro aliaj kialoj, s-ro Pankiw poste forlasis la partion kaj nun servas kiel sendependa parlamentano). Laŭ la propono, oficejoj de la federala registaro disponigus servojn en ambaŭ lingvoj nur tie, kiel almenaŭ kvarono de la servataj homoj estas anoj de la malplimulto. La parlamentanoj de la Kanada Alianco, kiel grupo, ne faris decidon pri la propono. Anstataŭ, ili rajtis libere voĉdoni por aŭ kontraŭ.

La oficialaj politikoj de la Kanada Alianco koncernas nur la du oficialajn lingvojn, kaj diras nenion pri aliaj lingvoj. Tamen, rilate multkulturismon, ili diras ke la partio certigos, ke kanadanoj de iu ajn kulturo rajtos konservi gravajn partojn de sia kulturo - sed sen mono de la registaro. Lingvo estas parto de kulturo, do supozeble ili ĉi tie parolas ankaŭ pri tiaj lingvoj. Mi supozas ke la Alianco ankaŭ estus tolerema al Esperanto, sed nenio en la oficialaj politikoj klare tion asertas.

La aliaj partioj

La Nova Demokrata Partio apogas la Leĝon pri Oficialaj Lingvoj. Tamen ĝi plendas ke la Liberala registaro ne sufiĉe apogas la celojn de la leĝo, kaj ke partoj de la registaro ne disponigas servojn kiujn ili devas proponi. Ankaŭ la Progresiva Konservativa Partio subtenas oficialan dulingvismon, kaj opinias ke ĝi estas plejgrava trajto de Kanado. Kiam la konservativuloj regis Kanadon, ili reverkis la Leĝon pri Oficialaj Lingvoj. Ili ŝanĝis multajn detalojn kaj klarigis la partojn malklarajn. La nova leĝo, Leĝo C-72, adoptiĝis en 1988, kaj estas leĝo, kiun la Liberala registaro ankoraŭ uzas. La Progresiva Konservativa Partio ankaŭ proponis doni monon al lokaj registaroj, asocioj k.s. kondiĉe ke ili disponigas dulingvajn servojn aŭ instruas unu oficialan lingvon. Ekzemple, ili donis 3.9 milionojn da dolaroj al TVOntario por franclingvaj elsendoj. La kebekia partio, la Kebekia Bloko, laŭ mia scio, laboras por ke la franca estu egalrajta al la angla, kiel postulas la Leĝo pri Oficialaj Lingvoj. Sed simile al la Alianco, ili opinias ke la federala registaro ne devas interveni pri lernejoj aŭ aliaj aferoj, pri kiuj la provincaj registaroj respondecas.

Dankoj

Por akiri informojn por verki ĉi tiun artikolon, mi sendis leterojn al la kvin partioj en la parlamento. Mi danku al la kvar homoj, kiuj respondis al mia leteroj: Salpie Stepanian (Kanada Alianco), Christine C. Abela (Nova Demokratia Partio), Joe Clark kaj John Herron (Progresiva Konservativa Partio).

Bruce Arthur

RECENZO DE LA NOVA PIV

NdIR: La eldoniĝo de la Nova Plena Ilustrita Vortaro ja estas grava evento en Esperantio. Mi unue devas konfesi ke mi mem eĉ ne posedas propran ekzempleron. Tre lastatempe, mi penis mendi ĝin per la retpaĝoj de UEA, sed ne sukcesis trovi ĝin tie! Mi tamen esperas akiri ekzempleron antaŭ la pretigo de la venonta numero. Intertempe, mi ĝojas prezenti al vi originalan recenzon de la verko. Legantoj certe interesiĝos aŭdi ke unu el niaj KEA-anoj, Steĉjo Norvell, multe kontribuis al la pretigo de ĉi tiu libro, aparte pri la medicina terminaro.

PLAĈE INFORMEGA VOLUMO

La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.
Sennacieca Asocio Tutmonda.
1268 paĝoj. ISBN 2-9502432-5-8.

Alvenis do la nova PIV en la avidaj manoj de la atendantoj. Sed ĉu ĝi kongruas kun la anticipaĵo?

La nova eldono multe pli okulplaĉas ol la antaŭa: oni elektis presi la kapvortojn en aparte klara senserifa tiparo, kiu forte elstarigas tiujn disde la teksto de la artikoloj mem, kaj tio estas granda serĉhelpilo. Ankaŭ aperas en preskaŭ ĉiu paĝduopo almenaŭ unu bildo por klarigi fakterminon; la antaŭa eldono grupigis tiajn bildojn en sekcieto fine de la libro, sed nun la vortaro vere rajtas sin nomi "ilustrita".

La reviziantoj estis multnombraj, kaj ilin gvidis Michel Duc Goninaz kaj (pri matematiko, natursciencoj kaj teknikoj) Klaŭdo Roux. Kiel oni supozus, oni aldonis amason da vortoj kaj esprimoj el la moderna mondo – ekzemple *repo* el popmuziko, *fasado* el komputiko, *mikroonda kuirilo* el la kuirejo; sed iom konsternas la forpreno de vortformoj kiel *arĥitekto* kaj *arĥeologio*. La nova PIV simple sendas la leganton al la formoj je *ark-* sen tie menci, ke la formoj je *arĥ-* estas ja tute oficialaj.

Interesa estas la decido de la reviziantoj ne plu uzi la encirkligitan N, kiu en la antaŭa eldono signis neologismojn kaj emis timi progresantojn for de vortoj jam de longe enradikiĝintaj, kiel ekzemple *bobelo* kaj *hasti*. Tiu decido plejparte laŭdindas sed samtempe rezultigas la senavertan aperon de vortoj apenaŭ uzataj: *mava* por "malbona", *nelge* por "antaŭ nelonge". Necesas tamen agnoski, ke ankaŭ *olda* kaj *pigra* iam troviĝis en ĝuste tiu kampo de strangaĵoj – kaj estas hodiaŭ sufiĉe konataj.

La nova eldono kolose pligrandigas la nombron de aŭtoroj cititaj en ekzemplaj frazoj, de ses ĝis kvindek tri! Nun en PIV oni trovas apud la tradiciajn Zamenhofismojn kaj Kabeaĵojn la vortigojn de Jorge Camacho, Rok-gazet', Tinĉjo kaj Tim Carr. Tio estas afero bonega; sed tre bedaŭrinde estas, ke spaco ne permesis indiki la precizan fonton de ĉiu tia citaĵo.

Kaj estas do eĉ pli domaĝe, ke la nova PIV ne aĉetebblas en elektronika varianto: la volumo enhavas tian kvanton da bonegaj informoj, ke vere doloras la nepovo traserĉi ĝian strukturon perkomputile, poranalize. (Ion kompareblan oni nun celas en la projekto *Reta Vortaro*, sed tio

neniel rilatas al PIV.) Ŝajnas eĉ, ke la tekston de la nova PIV oni pretigis per manaj redaktoj anstataŭ per aŭtomataj eltiroj el datenbanko: tion montras kelkaj nekonsekvencaj interpunkcioj (ekzemple ĉe *abonebla*) kaj la apero de "hoko" kiel titolo de la paĝo pri *koko*.


Malpli pedante ĝenas la impreson, ke oni ne reviziis la gramatikan kategorion de la radikoj. Temas pri la konata afero, ke [KOMB] estas verba (ĉar *kombo* nomas agon) kaj [BROS] substantiva (ĉar *broso* nomas nek agon nek econ). La kategorion de radiko la vortaro kutime indikas per la formo de la ĉefa kapvorto – PIV ĝuste prezentas [KOMB] sub *kombi* kaj [BROS] sub *broso*. Sed abundas esceptoj: [DEKLINACI] prezentiĝas substantive kaj [KONJUGACI] verbe; [DEMONSTR], [INAŬGUR] verbe kaj [DEMONSTRACI], [INAŬGURACI] substantive. Scii la karakteron de radiko estas gravege, se oni ne volas fuŝparoli ekzemple pri *martelilo* anstataŭ *martelo*.

Feliĉe la reviziantoj sukcesis forbalai la franca-centrecon de la antaŭa (Varingjena) eldono. La germandevena *strando* estas restarigita kiel pli ol nur sinonimo de la francdevena *plaĝo*; la esprimo *ŝati kafon* – kiu jam aperis en la *Plena Vortaro* de 1934 – estas ne plu evitinda; la ĉefurbo de Aŭstrio estas nun la unua senco de *Vieno* (anstataŭ la tria, post francaj rivero kaj urbo); kaj malaperis la bizara neniala komento sub *ingredienco*, ke "ingrediento estus la ĝusta formo".

Kompense pro la bonvenaj perdoj tamen enkondukiĝis pluraj novaj strangaĵoj. La difino de *acidiĝo* komenciĝas per la vorto "acidiĝo", en bela senfina ciklo. Astronomiaj nomoj kiel *Luno*, *Suno* kaj *Tero* aperas ŝajne ĉiam sen *la*, kio kontraŭas la kutimon de ordinara vorto uzata kiel propra nomo. Kaj ĉe *po* oni informas, ke "al ĉiu li donis po kvin dolarojn" oni komprenu kvazaŭ "al ĉiu li donis po kvin dolaroj dolarojn", dum fakte *po* funkcias tie ne kiel prepozicio sed ĝuste kiel *ĉirkaŭ* en "mi bezonus nur ĉirkaŭ ducent rublojn" (do kiel ia nombrouncilo).

Estas tre facile citi tiajn ĉi fuŝaĵojn, sed tio ne malpliigu la grandegajn utilecon kaj gravecon de la nova PIV. Vere devas esti, ke la revizia laboro ne malmultis sed mamutis, kaj la rezultita libro estas nedisputeble forta plibonigo de la pasinta eldono de antaŭ pli ol 30 jaroj. Ĉu post plua jartrideko ni ankoraŭ volos nomi ĝin "nova", estas neklare, sed ĉiaokaze PIV2 (kiel multaj jam ĝin nomas!) estu nepre posedaĵo por ĉiu serioza Esperantisto.

Sajmĉjo Davies (Britio)



AL LINGVA DEMOKRATIO!
ALVOKO AL LA ESPERANTISTARO

Karaj membroj (kaj ne-membroj),

Ni dankas ĉiujn tiujn el vi, kiuj dum la pasinta jaro kunlaboris kun siaj asocioj por la plenumo de la taskoj de la labor-plano. Laŭ via memoro ni estas speco de "garantia komisiono", kiu certigas, ke la labor-plano estos kunlabore plenumata de la membroj de niaj tri organizaĵoj.

La labor-plano emfazas la jenajn prioritatojn:

- * informado
- * instruado
- * utiligado
- * plijuniĝo
- * tutmondiĝo
- * profesiiĝo

Ili estas en si mem klaraj, kaj vi povas detale legi en la labor-plano mem, kiel ili estas komprenataj. Cetere la teksto de la laborplano estas ricevebla per mesaĝo al <uea@co.uea.org> aŭ per aliĝo al la listo <al-lingva-demokratio@yahoogroups.com>.

Dum la pasinta jaro multo estis realigata en la kampo informado kaj papera kaj reta, kaj kelkaj progresoj estis realigataj en ĉiuj aliaj labor-kampoj. En la nova jaro ni bezonas doni apartan atenton al "instruado", "utiligado" kaj "plijuniĝo".

Ni varme konsilas, ke en ĉiu lando kaj en ĉiu organizaĵo estu almenaŭ unu homo, kiu respondecas pri la realigo de la labor-plano kaj aliĝas al la listo, kie ĝuste oni diskutas pri tio, per malplena mesaĝo al la adreso

<al-lingva-demokratio-subscribe@yahoogroups.com>.

Ni kopias frazon de la pasintjara mesaĝo, kiu restas daŭre aktuala:

"Unu lasta afero devas esti klara al ĉiuj: ni ne bezonas konkurenci kaj batali inter ni. Ni estas ĉiuj laborantoj por la sama idealo preter kelkfoje tro rigidaj asociaj limoj. La labor-plano, kiun vi legos, emfazas la rolon kaj de UEA kaj de TEJO kaj de ILEI, kaj de ĉiuj aliaj esperantistaj asocioj, kaj ni ŝatus en ĉiuj landoj vidi kunlaboron, eĉ se kun la bezonata memstareco de ĉiu organizaĵo."

Ni faros nian komunan eblon por helpi vin kaj ni dankas vin pro viaj estontaj klopodoj.

Renato Corsetti, prezidanto de UEA
Holger Boos, prezidanto de TEJO
Mauro La Torre, prezidanto de ILEI
Trevor Steele, ĝenerala direktoro de UEA

NE FORGESU REALIĜI AL KEA
POR LA NOVA JARO (KAJ AL UEA AŬ ALIAJ
ESPERANTO-ASOCIOJ)
Por realiĝi al KEA, sendu ĉekon por \$20
al KEA, P.O. Box 2159, Sidney (BC), Kanado V8L 3S6

MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA (por aperigo en E-revuoj)

(R)estu membro de la E-komunumo!

Mi volas rediri al vi, kial indas esti kaj resti membro de la Esperanto-komunumo. La samon pli-malpli mi jam diris pasintjare, kaj mi restas nun samopinianta. Esence al la ĉiama demando: "Kial finfine mi devus aliĝi al la loka Esperanto-klubo, al la nacia landa asocio, al la asocio de mia fako aŭ hobbio, al Universala Esperanto-Asocio?" mi kutimas respondi, ke ekzistas almenaŭ du kialoj:

1) La Esperanto-asocioj je ĉiuj niveloj laboras por pli bona mondo, por mondo sen lingva kaj kultura diskriminacio; mallonge dirite, ili laboras por lingva demokratio. Se vi opinias, ke tiu estas bona celo, vi certe volas subteni ilin. Aliĝante al via loka klubo aŭ al monda, nacia aŭ faka asocio (eventuale eĉ al ĉiuj tiuj), vi estos parto de tiu tutmonda Esperanto-movado, kiu de pli ol unu jarcento laboras por homaj lingvaj rajtoj je ĉiuj niveloj, kaj kiu provas konvinki la mondon, ke ankaŭ en la lingva-kultura kampo justeco valoras pli ol forto.

2) Samtempe vi eble ŝatas simple esti parto de la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon Esperanto. Vi eble ŝatas renkonti aliajn parolantojn de Esperanto, vi ŝatas aĉeti librojn en Esperanto, vi ŝatas vojaĝi al fremdaj landoj, koni ties loĝantojn kaj eventuale eĉ esti gastigata de lokaj esperantistoj. Ĉion ĉi la membroj de Esperanto-asocioj faras des pli nature, estante daŭre informataj per siaj asociaj ligoj pri la revuoj, la libroj, la kongresoj, la ret-listoj kaj la ret-paĝoj, la korespond-anoncoj kaj la vojaĝ-ebloj je sia dispono. Kaj se vi apartenas al la komunumo de tiuj, kiuj normale ŝaltas sian komputilon antaŭ la matenmanĝo, vi trovos (aŭ jam trovis), ke esperantistoj ĉeestas pli kaj pli en la tutmonda reto kaj serĉas kontaktojn kun similaj esperantistoj. La avantaĝoj de asocia membreco estas similaj ankaŭ ĉi-kaze. Ekzistas diversaj diskutgrupoj por UEA-membroj, ekzemple, kaj nuntempe ankaŭ eksperimenta eblo ricevi la revuon Esperanto per Interreto en komputila formato.

Do estas grave, ke vi klopodu aliĝi al Esperanto-organizaĵoj je ĉiuj niveloj (loka, landa, faka aŭ internacia). Ni kompreneble invitas vin aliĝi aŭ re-aliĝi al UEA, sed ankaŭ se vi aliĝas nur al faka asocio aŭ al via loka klubo, tio jam estas io bona; kaj se vi aliĝas ankaŭ al via landa asocio, tio estas io ankoraŭ pli bona, ktp.

UEA pretas ĉiukaze sendi al aranĝantoj de naciaj aŭ lokaj renkontiĝoj stokon da revuoj de UEA de la pasinta jaro kune kun cirkuleroj por disdonado al la partoprenantoj - oni devas

tiurilate nur peti la Centran Oficejon. La celo de nia kampanjo estas "vastigi la komunumon", tio estas vastigi la nombron de organizitaj kaj interligitaj esperantistoj je ĉiu nivelo. Nia ĉefa celo estas ke la membroj de ĉiuj Esperanto- organizaĵoj pliiĝu kaj estu en kontakto inter si. Oni vastigas la komunumon ĉefe per informado pri Esperanto kaj instruado de Esperanto, sed ankaŭ tio estas senefika en la longa daŭro, se la parolantoj de Esperanto ne poste iel restas kune.

Ni restas je via dispono por kunlabori kun vi pri tiu ĉi celo.

Renato Corsetti, Prezidanto de UEA
<renato.corsetti@co.uea.org>

Internaciaj novaĵoj

ORA JUBILEA KONGRESO DE ELNA

Unue, iomete da historio! ELNA estas "Esperanto-ligo por Norda Ameriko". Ĝi estas efektive la Usona landa esperantista organizaĵo. Ĝi estis fondita en 1952 kiam multaj usonaj esperantistoj ne plu povis toleri la diktatoran manieron per kiu George Alan Connor estris la tiaman usonan nacian organizaĵon, EANA (Esperanto-Asocio por Norda Ameriko).

Tio estis la tempo de la fifama 'Komitato pri mal-Amerika Agado' (Un-American Activities Committee), de senatano Joseph McCarthy, kiu ruinigis la vivon de pluraj usonanoj kiuj ligiĝis iel ajn al komunismo. Ofte tiu "ligiĝo" estis tiel efemera kiel ĉe iu viro kiu devis konfesi ke lia avo, antaŭ multaj jaroj, estis membro de la komunista partio dum kelkaj tagoj, ĝis li ĉeestis kunvenon kie li eksciis pri kio temas, kaj tuj ekŝiĝis. Kutime personoj kiuj estis pridemanditaj de la komitato poste ne povis dungiĝi, ĉar aliaj personoj timis esti suspektitaj pri simpatio.

George Alan Connor subtenis la starpunktton de tiu komitato, kaj decidis ke oni devas priesplori ĉiun kiu volas esti membro de EANA, por esti certa ke tiu neniel ligiĝas al komunismo. Li ankaŭ denunciis la Universalan Esperanto-Asocion, ĉar ĝi akceptis membrojn el komunistaj landoj. En 1952, pluraj personoj kiujn Connor rifuzis akcepti kiel membrojn kunvenis en Sakramento, la ĉefurbo de Kalifornio, por diskuti la situacion. Sekvis fondo de "Reorganiza komitato". En junio 1952 kiam la EANA kongreso okazis en Sakramento, kaj la 'ribela grupo' baldaŭ konstatis ke ne eblos ŝanĝi la situacion de interne, kaj ili decidis fondi novan, demokratan, nacian Esperanto-organizaĵon. Dum kelkaj jaroj ekzistis du naciaj Esperanto-organizaĵoj en Usono, ĝis iom post iom EANA forvelkis, kaj malaperis.

Por festi sian oran jubileon ĉi-jare, ELNA kongresis en Sakramento, 50-jaroj post ĝia fondiĝo tie. Kun okdek du aliĝintoj, estis sufiĉe da talento por doni bonkvalitan programon! Vendrede fruvespere, dum registriĝo, kongresanoj ricevis pakaĵon kiu inkluzivis 33-paĝan raportaron pri ĉiuj komitatoj de ELNA, inkluzive financon raporton. Eblis tralegi ĉion antaŭ la aferkunsidoj, se oni volis esti preparita por eble fari demandojn.

Dum la interkonatiĝa vespero punĉo kaj manĝetaĵoj troviĝis sur tablo en la malantaŭo de la ĉambro, kaj oni estis libera vagi tra la ĉambro por babili kun konatoj, kaj ekkoni aliajn. Okazis kelkminuta kvizo, kiam Don Harlow faris demandojn, kiuj rilatis al Esperanto - personoj, filmoj, historio. Kun bone elektitaj demandoj, tio estas pli interesa (kaj instrua!) ol oni eble supozus.

Sabate je 8:30atm D. Gary Grady oficiale malfermis la kongreson, kaj D-ro Duncan Charters parolis pri "Kial kaj kien ELNA". Valorus ke ni faru simile pri KEA kiam ni havos kanadan kongreson - valorus HAVI kanadan kongreson! Sekvis parolado de Bill Harmon pri la 50-jara historio de ELNA, dum samtempe en alia ĉambro Don Harlow recenzis novajn librojn. Parto de la dokumentaro donita al ĉiu kongresano, estas la noveldonita sesdekdu paĝa ilustrita libro, *A History of the Esperanto League for North America* kiun S-ro Harmon verkis. Post lunĉo, laŭplace en unu el la kelkaj restoracioj proksime de Hawthorn Suites, la kongresa hotelo, okazis aferkunsido (alia afero tre dezirinda por KEA!) de 1:00-1:50. Sekvis preskaŭ "somera universitato" kun altkvalitaj prelegoj pri sciencaj/teknikaj temoj. D-ro Fred Meyer parolis pri farado de 'Siliciaj tranĉaĵoj' kiuj estas uzataj por fari integritajn cirkvitojn. La ilustraĵoj kiujn li montris bone komprenigis la komplikecon de temo! Ni tamen lernis iom, inkluzive la surprizan fakton ke estas nur tri fabrikoj en usono kiuj faras siliciajn tranĉaĵojn, kaj ĉiuj nun apartenas al ne-usonaj kompanioj!

George Baker, unu el la inĝenieroj kiuj desegnis la baldaŭ konstruotan novan "tertremrezistan" pendponton trans la golfon de Oakland, uzis belajn diapozitivojn por ilustrisian prelegon pri la procezo desegni tiajn pontojn, kaj specife tiun ponton. Sekvis konversaciaj rondoj por tiuj kiuj bezonas ekzerci paroladon en Esperanto, kaj por tiuj kiuj estas spertaj kaj volas helpi la aliajn fariĝi fluaj parolantoj. Samtempe okazis aliĉambre prezento de Ed Wiliger pri la "Pasporta Servo", servo per kiu aĉetintoj de la jarlibro de tiu organizaĵo povas trovi adresojn de personoj ĉirkaŭ la mondo kiuj pretas provizi senpagan dormlokon al vojaĝantaj esperantistoj. Librovendado okazis en aparta ĉambro de la 5a ĝis 6a ptm., kaj je diversaj aliaj horoj dum la kongreso. Je la fino de la sabata posttagmezo okazis pikniko en parko "Discovery", ne malproksime. La organizintoj rezervis lokon kie estis tabloj, kaj provizis abundan manĝaĵon. Poste, Miko Sloper kaj grupeto kantis Esperantajn kantojn, akompanate de gitaro. Antaŭ sunsubiro, ĉiuj reiris piede aŭ automobile al la hotelo.

Dimanĉe matene Ron Glossop prelegis pri Mondfereracio, Aleksandro Schlafer gvidis Lingvan Forumon, kaj Jakobo Schwarz titolis sian prezenton "Vojaĝante bicikle". En alia ĉambro televidaj teknikistoj instalas mikrofonojn kaj tri kameraojn, kaj profesiaj kameraistoj filmis la instrukurseton de D-ro Charters, kiu uzis la novan vidbendan kurson "Pasporto al la Tuta Mondo". La celo de la filmado estas montri al instruistoj kiel plej bone instrui per tiu vidbenda kurso. ELNA intencas disponigi kopiojn de tiu filmo al tiuj kiuj volas havi ĝin, espereble malmultekoste. Tio povos multe kontribui al efika utiligo de la "Pasporta" kurso.

Posttagmeze, post dua kvindek-minuta aferkunsido, Don Harlow diskutis kelkajn problemojn de moderna astronomio, kaj novaĵojn pri tio. En alia ĉambro Joel Brozovsky parolis pri "Lude lerni Esperanton". Ĉar ne ĉiuj interesiĝas pri la samaj temoj, estas bone havi elekton. Vespere okazis bankedo, bufedstilo. Miko Sloper parolis pri la meritoj de muzikisto/komponisto L. Harrison, kiu longtempe favoris Esperanton. Duncan Charters ridegigis ĉiujn per la jam fama "parolado de mondvojaĝanto" dum kiu li parolas Esperanton kun forta loka akĉento de la

vizitataj landoj. Sekvis aŭkcio de donacitaj Esperantaĵoj, kiun Ĉarli Galvin kompetente kaj sprite kondukis. ELNA gajnis 1200 dolarojn!

Lunde la eksprezidantoj de ELNA - kvin ĉeestis - parolis dum kelkaj minutoj pri la atingoj, problemoj, kaj memorindaĵoj de siaj deĵorperiodoj. Henry Studer legis la plej bonajn respondojn kiujn li ricevis al la demando antaŭe farita al aliĝintoj: "Kio estis la plej bona Esperanto-kunveno kiun vi memoras, kaj kial". Gary Grady oficiale fermis la kongreson, sed kiel kutime, la finiĝo de la oficiala parto de la kongreso ne signifis ke ĉiuj tuj foriras.

Posttagmeze la filmado de la dua parto de la kurso de D-ro Charters okazis, dum kelkaj aliaj esperantistoj iris al la ŝtata fervoja muzeo kun Bill Harmon, kaj ricevis senpage de li Esperantigitan version de ties gvidlibro. Ni ankaŭ ĝuis viziton al la Indiana Muzeo kaj al la Fortikaĵo de Suter, ekkonstruita en 1840, kie ni eksciis iom pri la loka historio kaj tiama vivmaniero, de kostumitaj klarigantoj. Maristo montris kiel uzi muskedon (la bruo kiam li pafas estas tre laŭta), kaj bestkaptisto montris kiel fari uzeblajn peltojn el feloj, kaj permesis spektantojn tuŝi ilin.

Marde Henry Studer gvidis ekskursantojn al interesa ŝtata historia parko por vidi muelan rokegon, sur kiu generacioj da indianoj pistis glanojn por fari nutraĵon. Ni piede promenis en la apuda ombra arbaro, kaj vizitis muzeon kie la historio de la lokaj indianoj, kaj ilia (ofte ne feliĉa) interago kun blankuloj, estas prezentita per bildoj kaj vortoj. Henry trovis ĉarman malnovan restoracion "Teresa's" en urbeto Jackson, kie ni bone ludiĝis, antaŭ ol daŭrigi la ekskurson tra la vinkampa regiono, kie ni vizitis belan vinfarejon, kaj (senpage) gustumis vinojn. Post reveno al Sakramento, kelke da ni iris al restoracio, kaj vespermanĝis hispane dum Gary Grady kaj aliaj rakontis anekdotojn kaj ŝercojn en Esperanto. La reveno al la hotelo estis la efektiva, se ne la oficiala, finiĝo de bona kongreso.

Estas preskaŭ certe, ke la usona kongreso venontjare okazos en Bostono, bela kaj histori-riĉa urbo certe vizitinda por Esperantistoj kiuj loĝas proksime, en orienta Kanado! Mi esperas renkonti vin tie!

Ken Price

JOHN BUCHANAN PRIZE, UNIVERSITATO LIVERPOOL PRESTIĜA PREMIO GAJNEBLA!


Ĉiujare, la supre menciita universitato aljuĝas ĉi tiun premion, kiu ligiĝas al posteno de lekciisto ĉe la sama institucio. Laŭ mia scio, ĝis nun oni faris publicon pri ĉi tiu premio nur en Britio; nun, la unuan fojon, pere de Lumo oni celas pli vastan komunumon. Post kontrolo, mi malkovris ke ĉiu homo kiu diplomigis en universitato ie ajn en la brita regnaro rajtas partopreni la konkurson. Jen la reguloj.

Kandidatoj devas verki originalan eseon pri unu el la tri temoj indikitaj sube (minimume 1000 vortojn). Ili devas ankaŭ traduki ian (ajn) tekston el la angla (aŭ eventuale, mi supozas, alia lingvo) en Esperanton (minimume 500 vortojn). La tri temoj ĉi-jare estas la jenaj:

1. Esperanto kiel perilo por komunikado en Scienco kaj Teknologio.
2. Cenzurado kaj Subpremado de Esperanto kaj Esperantistoj tra la mondo.
3. Kial Esperanto estas ideala unua lingvo por komencantoj.

Limdato por kontribuaĵoj: 1a de majo 2003. La adreso de la konkurso estas: The University of Liverpool, P.O. Box 147, Liverpool, Britio L69 3BX. La premio estas 150 pundoj (proks. 375 dolaroj). (NdlR: mi trovis la jenajn informojn en brita revuo, kie oni pretendis ke la eseo estu en la angla lingvo. Sed ĉar la titoloj estas en Esperanto, mi certas ke oni eraris; oni povus ĉiaokaze certigi la faktojn per letero al la universitato).

Nia solvo al la krucvortenigmo en la lasta (printempa/somera 2002) numero:



Gratulon al ĉiuj kiuj sukcesis!

Lastatempe Kon Fu Zita partoprenis Esperanto-kurson. Oni petis lin fari afiŝon por helpi la studantojn pri la gramatiko. Kon Fu tre fieras pri sia laboro:

Ne forgesu la akuzativo!

Nova krucvortenigmo por defii, eĉ frenezigi, vin:

1	2	3	4	5		6	7	8	9		10	11	12	13
14						15					16			
17						18				19		20		
								21			22		23	
	24	25								26		27		
28						29	30	31		32				
33				34						35				
		36	37			38		39				40	41	
42						43						44		
		45								46				
47	48		49		50	51								
52		53		54			55			56	57	58	59	60
61			62		63					64				
65										66				

dank' al Don Reble

Transen

- 1 tirkestaro (r)
- 6 aparta rajto (r)
- 14 okkrura besteto (r)
- 15 egale
- 16 ero de iu ajn materio (r)
- 17 birdo kun fiksita okuloj (r)
- 18 entendi ĝis io (r)
- 20 alta monto (r)
- 21 Otomanulo (r)
- 23 fabela estaĵo (r)
- 24 astra lumeto (r)
- 26 efektivaĵo
- 28 likvaĵo el sangkoagulaĵo (r)
- 29 sekvi ordonon (r)
- 32 atentigi (r)
- 33 kaŝnomo (r)
- 35 varmega (r)
- 36 granda ujo (r)
- 38 ĉiuokaze preta servi
- 42 kontraŭa dirmaniero (r)
- 43 naskigsekso

- 44 nematura (r)
- 45 fiksi per ŝnuro (r)
- 46 monereto (r)
- 47 moviĝi (r)
- 49 paroli melodie (r)
- 52 matena trinkaĵo (r)
- 54 bezonu trinki
- 56 frapmarki (r)
- 61 tersurfaco
- 63 fari mallongan sekan sonon (r)
- 64 ne kontraŭstari ĝenanton (r)
- 65 sensentiga drogo
- 66 filo de Laertes

Suben

- 1 monkesto (r)
- 2 perpendikla (r)
- 3 vasta salakvujo
- 4 la homoj
- 5 fluidiĝi (r)
- 6 hebrean kanton
- 7 eta mamulo (r)
- 8 agi kiel iu (r)
- 9 proksimiĝu
- 10 difina artikolo
- 11 malgranda
- 12 duoninsulo de akvo (r)
- 13 sinjetintan antaŭen
- 19 distorda vizaĝo
- 22 instruita (r)
- 24 kruronombro de insekto
- 25 superlativa adverbo
- 27 movanta lagero (r)
- 28 speciale difinitan
- 30 duparta naĝvesto (r)
- 31 tendenca sufikso
- 34 altrudas

- 36 kapbazo (r)
- 37 sensimila (r)
- 38 refleksiva pronomo
- 39 teksaĵo en la poŝo
- 40 loko
- 41 komuna insekto (r)
- 46 vizitiĝu
- 48 malofta, altvalora
- 50 malluma tempo (r)
- 51 ombr.,ornamarbo (r)
- 53 magneta metalo (r)
- 55 dividaĵo (r)
- 57 teksaĵo (r)
- 58 malsama (r)
- 59 katolika diservo (r)
- 60 kaŭze de
- 62 aternombro de nordamerika haltsignalo

— fino —